

"Spegulo"

Spegulo estos kvaronjara revuo kun soci-kultura enhavo. Ĝin redaktos la pola kvaropo: Tomasz Chmielik (ĉefredaktoro), Lidia Ligęza, Kazimierz Leja kaj Stanisław Śmigielski (sekretario de la redakcio). Inter la kunlaborantoj estas la nomoj de Zbigniew Galor, Małgorzata Komarnicka, Ilona Koutny, Teresa Nemere kaj Ryszard Rokicki. Atendataj estas ĉiuj samideanoj, enlande kaj eksterlande, kiuj volos pliriĉigi la novan revuon per siaj kontribuaĵoj.

SPEGULO estas turnita al leganto aktiva, lingve matura, kritike sekvanta okazantaĵojn en la moderna kulturo, eŭropa kaj monda. En estos en ĝi originalaj poemoj, rakontoj kaj teatraĵoj, sed ankaŭ tradukoj el la plej diversaj lingvoj.

Ni ne volas forgesi la historion de la Esperanto-movado, en kiu ni serĉos imitindajn ekzemplerojn kaj indikojn por la estonteco. Interesas nin serioza recenzado de verkoj aperintaj en Esperanto - recenzoj devas analizi la literaturan valoron de tiuj verkoj, ilian lokon en la literatur-historia perspektivo.

Multe da atento ni volas turni al la signifoplenaj eventoj kaj aĵoj en la arta vivo. Ni volas eliri el la verda "geto" kaj interparole kontakti elstarajn personojn de la kultura vivo.

Nin ĉiujn ligas la komuna sperto de tiu memorinda jaro 1989 - annus mirabilis - kaj ĉiuj ŝanĝoj, kiuj okazis en la politika kaj socia vivo, kiam finiĝis la komunista regado kaj formiĝis novaj ŝtatoj en la Meza kaj Orienta Eŭropo - en tiu parto de la mondo, kiu estas nia loko surtere. Tial ni volus montradi al Legantoj la gravecon kaj signifon de la jaro 1989 kaj la sekvon por ni, kiel parto de ESPERANTUJO.

Ni deziras, por ke *Spegulo* estu malferma, sen limigaj antaŭkondiĉoj aŭ tendencoj. Ĉiel ni klopodos, por ke Esperanto fariĝu perilo inter homoj kun diversaj opinioj, kun malsamaj spertoj.

Per SPEGULO ni intencas konvinki Esperantistojn, ke la Zamenhofan lingvon ili lernas kaj praktikas ne nur por kongresumi kaj plum-amikadi, sed ankaŭ por vastigi siajn pens-horizontojn.

Tomasz Chmielik

EI: POLA ESPERANTISTO, n-ro 29(5/2007).

Spegulo - socik-kultura revuo en Esperanto, aperos kvaronjare komence de la jaro 2008. La unua numero de SPEGULO aperos meze de marto.

64-paĝaj kajeroj en formato A5, nigra-blankaj,
kun kartona kovrilo, estas aboneblaj jam
(kiel jarabono por ĉiuj kvar kajeroj).

Prezo por enlandaj adresoj: 45 zł (inkluzivas

VAT

kaj sendokostojn). Prezo por eksterlandanoj: 18

EŬR

(+ 6 EŬR por eventuala prioritata ekspedado).

Abonojn akceptas: Wydawnictwo HEJME

PL 41-250 Czeladź, ul. Wąska 21

mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

BIC/SWIFT:

BREXPLPWMBK

Loĝantoj de landoj de Eŭropa Unio pagas neniujn
bankajn pagojn! Abonantoj el landoj ekster EU povas aboni pagante
al la UEA-konto: <kazl-s> de Kazimierz LEJA.

*Ekaboni SPEGULON por la jaro 2008 - kiu estu fruktodona
por ni ĉiuj - volontigas VIN - redakcio el Pollando, Eŭropo
kaj el Esperantujo.*